

THE ELNA NEWSLETTER

News of the Language Problem and Esperanto as a Solution

1989 (4)

Making News This Issue

Off Limits: The UK in Cuba

U.S. government restrictions on the travel of U.S. citizens to Cuba make the upcoming Universala Kongreso off limits to Esperantists in the U. S. To get the details on this problem, you won't want to miss the announcement in this issue from ELNA president Ken Thomson and Wm. Harmon, the UEA Delegate for the U.S.

See Page 3

Stranger in a Strange Land

You're probably used to reading about the problems Americans have when traveling overseas, but have you ever stopped to think about what tourists coming to the United States must go through? A French physician describes his experiences.

See Page 7

Land Without a Name — the U.S.!

The derivation of the Esperanto word for the United States — *Usono* — has been much discussed of late. But the discussion is nothing new. A letter to *The American Esperantist*, dated 1908, recently surfaced in the Central Office. We reprint it here.

See Page 9

In This Issue

Editorial 2

Lingva Angulo 8

Volas Korespondi 11

And Much, Much More to
Delight and Inform You!

ELNA Premiita!

La Trofeo Fyne

Dato: 1989 04 14

Estimataj,

Dum sia kunsido en marto, la Estraro de UEA aljuĝis la Trofeon Fyne en 1989 al ELNA. Vi komprenas, laŭ la priskribo sur paĝo 52 de la Jarlibro 88, ke per tio la Estraro celas rekonii la revigliĝon de ELNA lastatempe. Ne necesas, ke mi detale prezentu tion al vi, evidente, sed ni ricevas fortajn efiojn de pli profesieca kaj laŭcela agado.

Povas esti, ke laŭ striktaj kriterioj de nombro de Individuaj Membroj (vidu la martan numeron de la revuo) tiu plifortigo ankoraŭ ne esprimiĝis en la statistiko, sed la spezfolioj por 1989 jam estas promesplenaj. La kriterioj por aljuĝi la Trofeon ne limiĝas al Individuaj Membroj, kiom ajn grava tio estas; faktoro estas la kontribuo al fortigo de UEA, kiun la Estraro juĝis pozitiva.

Mi estas taskita, anonci la novaĵon al vi, kaj estas plezuro al mi tion fari. La oficiala anonco okazos kadre de la Kongreso en Braĵtono.


Kun koraj gratuloj, kaj espero de estonta kunlaboro,

Neil Salvesen
Direktoro de la Centra Oficejo

[La Trofeo Fyne, donacita memore al Adam kaj Erica Fyne el Kanado, estas aljuĝata ĉiun duan jaron fare de la Estraro de UEA al tiu landa asocio aliĝinta al UEA kaj kun pli ol 150 membroj, en kies lando okazis la plej granda proporcia kresko de la nombro de individuaj membroj de UEA dum la antaŭaj du kalendaraj jaroj, aŭ kiu alimaniere grave kontribuis al la plifortigo de UEA. Aliaj gajnintaj landaj asocioj estas tiuj de Belgio, Bulgario, Ĉinio, Francio, Hungario, Japanio kaj Svedio.]

THE MEMBERSHIP THERMOMETER 1989

The stippled area shows total 1989 paid ELNA membership at the end of June, 1989; this is compared with four milestones/targets: total paid membership for 1987, total paid membership for 1988, the "magic number" 900, and the number needed to add a second person representing ELNA to the UEA Committee. Let's bust the thermometer in 1989!



EDITORIAL

Anglophilia and Anglophonia

Some eight years ago, at the ELNA Congress in New York, a member of ELNA asked me why Esperantists were so down on English. The answer, I think, is that it is not English that bothers us—most members of ELNA, myself included, use English far more than we do Esperanto—but the pretensions of those who insist that English is the world language. In 1981, those pretensions were as annoying as they had ever been; by 1989, they've become almost intolerable, as Americans and others, reacting to a belated recognition that English is not, in fact, the global language they have always taken it to be, nor even the uncontested language of the United States, have started confusing contemporary global anglophilia (enthusiasm for English) with global anglophonia (ability to speak English). In 1981, five hundred million people spoke English, or so it was said; in 1982, *Newsweek*, in a cover story (encouraged, I like to think, by a reporter's encounter with *El Popola Ĉinio* in a Chinese railway station), boosted the figure to seven hundred million; in 1986, the PBS series *The Story of English* had the figure up to a billion; and in 1989, the *British New Internationalist* speaks of 1.4 billion English speakers in the world. *The World Almanac and Book of Facts*, of course, quotes a figure of 432 million English speakers in the world. But the criterion of the table's author, Dr. Sidney Culbert, for what constitutes an English-speaker may be more stringent than that of *Newsweek*, *The Story of English*, or the *New Internationalist*; Dr. Culbert insists that, to be considered a speaker of English, an individual must actually be able to speak English.

ELNA members continue to send me interesting articles on this topic. Conrad Fisher of Meadville, PA, has provided an article by columnist Richard Reeves, "Super-Language: A New English Empire Is Conquering the World." Mr. Reeves, who reverts to *Newsweek's* figure, quotes Chinese democracy banners in English, the fact that Sweden's official second language is now English instead

of German, the title change of three French scientific magazines (discussed here last issue), the use of American terms in automobile repairs around the world, and the fact that 95% of the world's technical papers appear first in English (most of the rest are in Japanese), as proof of the spread of English.

Response: the Chinese English-language banners, which were aimed not at the Chinese population (as Reeves admits) but at America through CNN and CBS, might all have been designed by the same person, and perhaps not even by a Chinese; in the pictures I saw, at least one of them was being carried by a blond student, and there are no blond Chinese. Sweden does not now have, and to my knowledge never has had, a second official language (neighboring Finland does have two official languages, Finnish and Swedish). American terms for auto parts are not even used in the rest of the English-speaking world; the British have a totally different automotive terminology. An independent study by a Dutch institute in the late seventies showed that about sixty percent of all technical papers are published in English, a figure not much different from that offered by UNESCO in the late 1950s; most of the rest are in Russian, French, German, Chinese. If five percent of the world's scientific papers are today published in Japanese, in fact, that five percent will have been gained at the expense of the English share, since until recently most scientific papers in Japan were published, as a matter of course, in readable (though definitely not perfect) English.

Miriam Chown of El Cerrito, CA, provides a letter to the *New York Times* from one Maurice B. Rosalsky of Englewood, N.J., who describes his experience with the language situation in Finland. Sitting in the Puyo Tower restaurant in Kuopio, says Mr. Rosalsky, "when we asked for water we found that none of the staff could speak English." Mr. Rosalsky got his water only through the imaginative use of sign language. Apparently the restaurant staff had failed to pay sufficient attention to Mr. Reeves' column.

Victor Munson of Escondido, CA, has

sent us a full page article from the *Christian Science Monitor* of May 1, in which Clayton Jones, a *Monitor* staffer, describes the rapidly deteriorating position of English in the Philippines. On an official level, English has largely been replaced by Filipino (Tagalog); this is particularly evident on television, where since Cory Aquino took power English has been banished from prime-time. University courses are being rapidly converted from English to Tagalog as the medium of instruction. At a more basic level, today for the first time more Filipinos speak Tagalog than speak English; and the quality of the English that is spoken is miserable. U.S. authorities, campaigning for popular support for the retention of Clark Air Force Base and Subic Bay Naval Base, have now switched from the English language (which produced no results) to Tagalog and Cebuano.

The May issue of UEA's *Esperanto* quotes an interesting survey carried out by a British advertising agency in Continental Europe. I quote: "A typical selection of adults in various countries were asked for their own estimate of their ability to understand [English], and this was then tested with three taped sentences. Huge differences became obvious. In the Netherlands [where, so I have always been told, everybody speaks English-ed] somewhat fewer than 50% were able to translate a given sentence, in Italy only 6%. There were such differences even in one country, e.g. between French-speaking Belgium (6%) and the Flemish part (46%). Younger people were shown more capable in English: in the example of Belgium, 7% and 72% respectively of those under 25 succeeded in the translation. Despite this more positive sign, the report concludes that understanding of English 'is remarkably below our most pessimistic expectations.'"

Let us all be aware—unlike Mr. Reeves—that Anglophilia and Anglophonia are not the same, and that the world today is no more Anglophone than it has ever been.

Don Harlow

NEWSBRIEFS

Esperanto in the Media

The *SERVAS International News* (Autumn, 1988) devotes a long article on its second page, "Esperanto Servas la Pacamikon", to Esperanto and experiences through Esperanto by the author, Mr. Henry Bilbrough of Lakeside, Gloucestershire, England.

The Connecticut *Jewish Ledger* (April 6, 1989) devotes a large front-page article to Dr. Humphrey Tonkin's ties with the Zamenhof Center in Bialystok and the relationship with modern Jewish history. In an interview, Dr. Tonkin emphasizes the important Jewish role in the history of Esperanto. (from the Central Office)

The University of Hartford, CT, *Observer* (April 7, 1989) describes university President Dr. Humphrey Tonkin's trip March trip to Poland to participate in planning the Zamenhof Center, and

mentions that Zamenhof was the inventor of Esperanto, "the most successful of the various attempts to create a universal language." (from the Central Office)

In "A time to remember" appearing in the New York, NY, *The Jewish Week*, (April 28, 1989), David C. Gross describes the development of Esperanto in its formative years. (thanks to Rochelle Grossman)

ELNA member Jerry Veit mentions the UK held in Augsburg and emphasizes Esperanto's role in tourism and international understanding in a letter "Deutsche in Wisconsin" which appeared in the German-language Chicago, IL, *Amerika Woche* (6 May, 1989). The letter gives addresses for the Germana Esperanto-Asocio and ELNA. (sent by Jerry Veit)

A 6-page article, "El Esperanto en Puerto Rico" by Tomas Sarramia, appeared in the San Juan, PR, *Faro Internacional* (May 1989). It describes the general history of Esperanto as well as the history of the Esperanto movement in Puerto Rico. (from Cathy Schulze)

An article by Thomas Gray, "Esperanto Club founded," in the *Spotlight* of the Houston, TX, High School for the Performing and Visual Arts, describes the founding of the club, which meets weekly, and gives an overview of the history, current use, and facility of Esperanto. (sent by Thomas Gray)

Aficionados of the TV game program *Jeopardy* (June 8, 1989) now know that "The English translation of the Esperanto words *blua birdo*" is "blue bird." (noticed by the editor by accident)

GRAVA ANONCO—IMPORTANT ANNOUNCEMENT ABOUT THE 75TH U.K. IN HAVANA, CUBA

Because of the provisions of U.S. law (Code of Federal Regulations 515.201), neither ELNA nor any of its officers or employees nor the UEA Chief Delegate, USA, may receive payment for registration for the 75th U.K. in Cuba in 1990 for transmission to UEA or to Cuba. To avoid any possibility of there being subpoenaable records indicating any intention on the part of a U.S. citizen to unlawfully expend funds in Cuba, ELNA's Central Office will not forward to UEA any registration form for the Havana U.K. but will return such forms to the sender. This is the first—and hopefully the very last!—time that we find ourselves in the position of not being able to help U.S. Esperantists. It is—to put it charitably—a disgusting restriction, and one totally beyond our control. We trust that U.S. Esperantists will understand our frustration in this situation.

Ken Thomson
President, ELNA

Wm. R. Harmon
UEA Chief Delegate for U.S.



REGIONAL REPORT

Esperanto Activity in the United States

ARIZONA

A summer course in Esperanto is being taught at Arizona State University by Bill and Angelina O'Ryan.

CALIFORNIA

Karen McKean, programestro de Radiostacio KVEN en la urbo San Buenaventura, vizitis kunvenon de la Esperanto-Asocio de Ventura Kantono vendredon la 7an de aprilo; la postan matenon ŝi parolis dum kelkaj minutoj, en radio-elsendo, tre favore pri Esperanto.

S-ro Uwe Lohse de Danlando estis gasto en la hejmo de Elwin Reed de la Esperanto-Asocio de Ventura Kantono dum kelkaj tagoj. Mardon vespere, la 9an de majo, okazis akcepto por Uwe en la hejmo de s-ro Reed, kaj la plimulto el la membroj de la Asocio ĉeestis kaj ĝuis tre plaĉan kaj interesan vesperon de intima babilado. (el bulteno de la Asocio)

D-ro James Fonseca kaj d-ro Mike Bondelid, anoj de la Esperanto-Asocio de Ventura Kantono, aranĝas Esperantan kursvojaĝon, subtenatan de California Lutheran University. La kurso estos por grupo da universitataj studentoj kaj aliaj interesoj, kiuj vojaĝos al la Esperanta Kultura Centro en La Chaux-de-Fonds, Svislando, de la 5a ĝis la 31a de januaro, 1990. Por informoj: d-ro James Fonseca, California Lutheran University, 60 West Olsen Rd., Thousand Oaks, CA 91360.

La 15an de junio, Prof. Ronald Glossop de Suda Ilinojsa Universitato, Edwardsville, IL, paroladis antaŭ la Mondfederistoj en Oakland pri "Konstrui Internaciajn Instituciojn por la 21a Jarcento." Post diskuto pri la neceseco de fortaj juraj, obeigaj kaj politikaj institucioj, Prof. Glossop dediĉis iom da tempo al la demando de Internacia Lingvo, kaj vekis sufiĉe viglan diskutadon inter la ĉeestantoj.

IDAHO

La ĉiujara Kunveno de la Esperanto-Grupo Intermontara okazos la 29an de septembro ĝis la 1a de oktobro en la

University Inn, Boise, ID. Registra kosto estos \$40 por manĝoj kaj servoj. La temo estos: "La Esperanto-Klubo: La Koro de la Movado". Por informoj: David Barron, P.O. Box 37, Eagle, ID, 83616, tel. (208) 939-4287 aŭ (208) 939-6174. (el la *EGI Raporto*)

ILLINOIS

Klaso de kelkaj dotitaj studentoj en la Lernejo Columbus, Edwardsville, kunsidis du fojojn semajne inter la 17a de Januaro kaj la 27a de aprilo por lerni Esperanton. Oni uzis la libron *Let's Talk Around the World* de Charlotte Kohrs kaj ankaŭ la revuon de Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo. En la foto (sur paĝo 5), lernantoj Molly Pate, Sara Gocken, Jessica Grant, Randy Schmidt kaj Al McLoone uzas la hungaran Esperanto-ludon "Domiling" por lerni vortojn, dum ilin rigardas la instruisto, Prof. Ronald Glossop de Suda Ilinojsa Universitato en Edwardsville, kaj la lernejestro, s-ro Novotny. (informas Ron Glossop)

MICHIGAN

La miĉiganaj esperantistoj nun aranĝas provizi ekzemplerojn de Esperanto: Learning and Using the International Language" kaj la Wells-vortaro al diversaj bibliotekoj en sia ŝtato, pere de la Librodonaca Fonduso "Semoj", tiucele starigita. La agadon kunordigas Michael Larkin; kiel konsilantoj funkcias Doug Portmann, Cathy Schulze kaj Bern Wheel. (el cirkulero de la Fonduso)

MONTANA

Charles W. Tustin, Poŝtestro de la urbo Coram, estas sperta esperantisto; kaj lia poŝtofiĉejo estas eble la sola en la mondo, kiu reklamas sin en Esperanto, per la vortoj USONO-POŜTOFIĉEJO. S-ro Tustin, kiu cetere estas Sekretario de la Esperanto-Grupo Intermontara, kolektas naciajn flagojn, kaj ĉiutage hisas alian naciajn flagon apud la usona. (laŭ raporto de J. J. Pirato en *Monato*, septembro 1988, alsendita de Nels M. Nelson)

NEW MEXICO

Dum la 27-28a de majo, dek-unu samideanoj kaj unu hundo kunvenis en la montaro ekster Albuquerque por semajnfino de esperantaj aferoj—la kvara EGI Senkrokodiliga Semajnfino. La partoprenantoj provis paroli nur Esperanton kaj ĉiuj lernis novajn vortojn kaj frazojn. La grupo honorigis per la ĉeesto de Roan Stone, fama esperantistino kaj fondinto de nia Esperanto-Grupo Intermontara


La Kunveno okazis ĉe Pinon Canyon Camp en Tijeras. La grupo ĉiutage ludis vortludojn, donis prezentaĵojn, kaj legis verkojn de la Limigita Literatura Konkurso. Ni ankaŭ verkis ridigajn teatraĵetojn, kaj aŭskultis kaj kantis esperantan muzikon. Roan rakontis pri siaj spertoj en aliaj nacioj parolante esperante. Ni eĉ lernis kuir *sopapillas*. Ne estis sufiĉa tempo por fari ĉion. (El la *EGI Raporto*)

NEW YORK

La 5an de majo, ĉe sia monata kunveno, la Esperanto-Societo de Novjorko ricevis standardon de la Koreia Esperanto-Asocio de s-ano Chaanshik Choi, kaj la Bialistokan Esperanto-standardon de s-anino Jadwiga Piotrowska. (el la monata bulteno de la Societo)

OHIO

Grande sukcesis Esperanto-kiosko ĉe la Dayton Hamvention, kongreso de radio-amatoroj, kiu okazis en Dayton la 28-30an de aprilo. La kioskon prezentis John Starling, Phil Driscoll kaj Bern Wheel. Ĉeestantoj prenis pli ol 2000 ekzemplerojn de la unua poŝtakursa leciono, kaj Bern vendis multajn librojn, inkluzive tiun de Richardson. Unu ekzempleron de "Teach Yourself" aĉetis radioamatoro el Germanujo. Kelkaj esperantistoj haltis por paroli esperante kun John aŭ Phil. Helpis en la budo ankaŭ Ed Lindberg, ano de la Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj, kaj Nils Young. (el *La Ligileto*)



LA CENTRA OFICEJO

La fiska jaro 1988/89 alportis multajn sukcesojn al la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, sukcesojn kiuj estas samtempe ĝojigaj kaj stimulaĵoj. La membronombro estas je la ĝisnune plej alta nivelo, la informpetoj pri Esperanto plinombriĝas, la vendoj kaj profitoj de la ELNA Libro-Servo trafas rekordajn nivelojn, dum membroj kaj kluboj plimultnombre kunlaboras pere de la "Informpetanto Exchange Program" kaj la "National Talent Bank".

La progresoj kiujn ni faras estas instigaj, ĉar ili indikas pli helan kaj lumoplenan estontecon por Esperanto en Usono. Semtempe ili estas malfacilaj, ĉar ili memorigas nin, ke pli da kunlaboraj agadoj estas bezonataj.

Vidante la grandan kvanton de novaj libroj eldonataj en Esperanto kaj sciante,

ke la nombro de novaj titolaj kreskas, mi ne povas ne pensi pri la multaj homoj, kiuj dum jardekoj eluzis sian tempon, kaj eĉ endanĝerigis siajn vivojn, penante, ke la mondo havu Esperanton hodiaŭe.

Rigardante la ĵus alvenintan numeron de *Heroldo* aŭ *Monato*, oni facile povus neglekti, ke pro la laboro kaj antaŭvido de unu homo, ni havas la diversecon de literaturo kaj metodoj de vere internacia kunlaboro, kiujn ni disponas nuntempe.

Se la laboro komencita de Zamenhof ne estus antaŭen portita fare de posteuloj, la mondo certe estus loko pli malriĉa. Se ili, al kiuj ni tiom ŝuldas, levus senpove siajn manojn al la ĉielo, aŭ permesus, ke la negravaj personaj disputoj kaj la potencakirado, kiuj fojfoje akozas en Esperantaj komunumoj, senkuraĝigu ilin, kie ni estus hodiaŭ?

La fakto estas, ke ni staras sur la ŝultroj de gigantoj, gigantoj, kiuj havis la antaŭvidon de pli bona mondo kaj la internan forton por antaŭeniri dum aĉaj kaj samtempe danĝerplenaj tempoj.

Kia estos nia kontribuo al la antaŭeniro de la revo de vere internacia komunikado? Kion niaj posteuloj diros kaj opinios pri ni?

Ni atingos nian celon se ni prijuĝos niajn agadojn rilate antaŭenigon kaj uzadon de Esperanto en rilato kun longtempaj strategioj kaj planoj. Dum la mondo estas daŭre ŝanĝiganta, kaj novaj eblecoj estiĝas dum malnovaj malaperas, ni devas havi la paciencon kaj la emon antaŭeniri, eĉ kiam la vojo ŝajnas esti suprenira.

Mark Stephens

Redaktoraj Politiko kaj Problemo

1) **Landnomoj.** Lastatempe aperis t.n. "norma listo de landnomoj" de la Akademio de Esperanto. Tuj je ĝi apero, s-ano Stefan Maul, redaktoro de la revuo *Monato*, promesis fidele obei ĝin kiel Akademian decidon. Kiel skribis Mark Fettes, redaktoro de Esperanto de UEA, "ĉi tiu revuo ne tiom hastos". Kiel mi jam indikis en pli frua numero de la *Novajletero*, ankaŭ mi ne tiom hastos...

Precipe ĝenas kelkaj formoj, kiuj estas tute nekutimaj, ekz. *Koreo* anstataŭ *Koreio*, *Zelando* anstataŭ *Novzelando*, *Vjet-Namo* anstataŭ *Vjetnamio*. Tiajn nekutimaĵojn mi intencas kiel eble plej multe eviti, parte pro ilia nekutimeco, parte pro la fakto, ke kelkakaze ili ege ĉagrenas la loĝantojn de la koncernaj landoj.

Kio kondukas al pli grava kritiko. Laŭ mi, la problemoj de landnomoj estas socia, ne gramatika, problemoj. Zamenhof skizis du vojojn, laŭ kiuj oni povus krei landnomon; sed kiun vojon oni sekvu, tion devas verŝajne decidi mem la homoj, kiujn plej grave tuŝas la problemoj—la landanoj mem. Do en la kazo de *Koreio*, estas la koreoj, kiuj devas solvi la problemon. Verŝajne ili mem solvis ĝin per *Koreio*. La insistado pri la "internacieco" de *Koreo* estas okcidentaŭropa antaŭjuĝo.

Cetero, laŭ la difino de la taskoj de la Akademio, ĝi devas "kontroli" la lingvan evoluadon de Esperanto. "Kontroli", laŭ PIV, signifas nur "esplori"; neniam, laŭ aparta noto en tiu sama vortaro, ĝi havas

la anglan sencon "regi, direkti". Do estas iom arbitra, laŭ mi, ke la Akademio prenas sur sin la taskon krei tute novajn formojn, ĝenerale nekonatajn en la internacia uzado.

2) **HELPU MIN!** Dum lastaj monatoj, iomete malpli rapidiĝas la takto de enfluo de informoj, recenzoj, artikoloj, ktp. Restas eldonataj tri numeroj por 1989; el tiuj, du havos 16 paĝojn. Parton de la ekstra spaco mi plenigos per ekstrapaĝoj da korespondanconoj, pro lastatempa amasa enfluo de korespondpetoj el Pollando. Sed prefere ni havu ion pli sukan por legi. De vi, karaj legantoj kaj ELNAanoj, mi petas la sukaĵojn. Ne timu proponi viajn legindajn verkaĵojn!

Don Harlow



R. Glossop teaching in Illinois
(see page 4 "Illinois")


PASOJ

DONOGHUE/WELLS

La Esperanta Societo de la Karolinoj kaj Virginio petas, ke la legantoj de la Newsletter kun ni deziru multan feliĉon al Betty Wells kaj Charles Donoghue, kiuj geedziĝis la 2an de julio. Ili interkonatiĝis je antaŭa kunveno de ESKV. Ili havos mielmonaton ĉe la SFŜU Esperanta Kurso.

POLLOCK

Longtempa esperantisto s-ano Elwyn C. Pollock de Morongo Valley, CA, subite forpasis pro infarkto je la 20a de junio. S-ano Pollock, 88-jara, estis dum multaj jaroj ELNA-ano kaj delegito de la Universala Esperanto-Asocio.



LETTERS

[Note: The letter column is a free-speech forum for members of ELNA. Views expressed are not necessarily those either of the editor or of the Esperanto League for North America, Inc.]

[Roan Stone, longtempa usona esperantisto, tradukinto de *La Profeto* de Gibran kaj unu el la ĉefaj laborantoj en la Bahaa Esperanto-Ligo, lastatempe suferis gravan personan perdon. Al ŝi ni ĉiuj kondolencas.]

Pere de la ELNA Newsletter mi kaptas la okazon esprimi al ELNA-legantoj miajn profundajn kaj elkorajn dankojn okaze de la spirita kaj mensa subteno pro la forpaso de mia amata edzo Jim Stone. Mi sciis, ke ĉiuj ELNA-anoj staras ĉe mi kaj fortikigas min per siaj preĝoj; se ne pro tio, mi dubas, ĉu mi povus elteni la streĉegon dum tiuj malfacilaj horoj.

Precipe mi deziras danki al tiuj, kiuj sendis kondolencojn per leteroj, kartoj, floroj kaj telefono, kaj ja al tiuj, kiuj sendis mondonacojn. Estas tiu malavareco parte de la ELNA-anoj kiu ebligis al mi pagi la \$3100, la koston de la enterigo. Tio inkluzivas la bronzan tabulon, kiu estos preta iam en majo.

Mia adreso post la 10a de junio estas: c/o Eakin, Rt. 1, Box 46C, Hallsville, TX 75650. Mi esperas, ke vi ĉiuj ELNA-anoj restos en kontakto kun mi. Kun amemaj kaj elkoraj bondeziroj,

Roan Orloff Stone

[Dr. Richard Mullins is working with a new idea of tri-lingualism, in which Esperanto plays a role.]

I agree with Bernard Golden's idea concerning a Pan-American Esperanto magazine.

In 1987 Holly Head and I wrote a mini-course in Esperanto using the tri-lingual format.

Now we wish to revise the mini-course and expand it into a book consisting of 300 pages = 100 in English + 100 in Esperanto translation + 100 in Spanish translation. We are looking for co-authors.

The mini-course was too brief, and it did not do justice to the new concept of tri-lingualism.

We hope to have the new book com-

pleted by 1990. Your input is welcome.

Dr. Richard Mullins

[For those interested, Dr. Mullins' address is: 342 West Washington, Macomb, IL 61455.]

[Mark Chartier malkonsentas kun la sinteno de Barbara Colt pri la akuzativo post "po".]

Mi volas respondi al letero de Barbara Colt en la *Novajletero*. Ŝi asertis, ke oni diru "Ili manĝis kukojn po du", ĉar la prepozicio rilatas al la numeralo kaj ne al la substantivo. Mi opinias, ke ŝia ekzemplo ne estas bona ĉar oni ne uzu la prepozicion por esprimi tiun senton. Oni diru nur "Ili manĝis du kukojn". Jen pli bona ekzemplo: "Ili manĝis du kukojn po unu kuko por ĉiu homo" (ĉiu homo manĝis unu kukon). La substantivo aperas dufoje, unue kiel rekta komplemento (kukojn), due kiel komplemento de la prepozicio. *Neniam* uzu akuzativon post "po".

La redaktisto demandis ĉu oni uzu la akuzativon post "anstataŭ". Oni povas diri, "Mi vidis lin anstataŭ vidi ŝin". La komplemento de la infinitiva verbo "vidi" estas en la akuzativa kazo. La komplemento de "anstataŭ" estas la tuta infinitiva frazo, "vidi ŝin", ne la akuzativa pronomo "ŝin". Tial, la regulo, ke prepozicia komplemento estu nomnativa, konkordas kun mia ekzemplo.

Mark J. Chartier

[Laŭ mia persona opinio, la vorto "krom" kaj "anstataŭ" pli similas al konjunkcioj kiel kiel, ol al prepozicioj. Sed la klarigo de s-ro Chartier permesas, ke oni diru "li vidas lin anstataŭ ŝin" per simpla subkompreno de ellasita vidi, sen atenco al la *Universala Vortaro*. Pri "po": kvankam numeraloj determinas substantivojn, ili ne modifas ilin, do ne estas adjektivoj; kaj jam dum unu jarcento, oni alkitimiĝis diri "kukojn po du". Laŭ la vortorda libereco, oni rajtas ankaŭ diri "po du kukojn", same kiel oni povas diri "mi vidas sur biciklo knabon" anstataŭ "mi vidas knabon sur biciklo".]

[Vortoj kunsentaj kaj konsentaj de Carlos I. de Jesus...]

Plej sincere mi gratulas vin pro la honorinda sinteno [en la ĉefartikolo de

1989(2)] rilate la vortojn "koreo, Koreio" kaj precipe kontraŭ la superflujaj, senbridaj kaj kelkriate senhontaj neologismoj.

Dum la tuta historio de Esperanto ĉiutempe troviĝis tiaj esperantistoj, kiaj ekzistas nun. Ĉar ili havas verkan, literaturan aŭ alispecan talenton en la Movado, ili konscie aŭ nekonscie atencas kontraŭ la tradicia Esperanto, trudante al la simpla geesperantistaro en la tuta mondo siajn "amatajn ĉevalojn" de "naturalismo", "riĉa sinonimaro", k.a.

Bonŝance la saĝo de la vera esperanta popolo ĉion superas, kaj tiuj bonigistoj kaj plibonigistoj, post kelktempa agitado, forlasas nin kaj transiras en la forgesojn de "naturalismo", kie morte ŝimas "Occidental", "Interlingua" kaj kompanio.

Carlos I. de Jesus

[Por novgeneraciaj esperantistoj, kiuj eble ne scias, "Occidental" kaj "Interlingua" estis aliaj, tre latinidaj, planlingvoj, iomete popularaj antaŭ 50 respektive 30 jaroj. Ili jam delonge malaperis de la interlingva scenejo, kvankam oni ankoraŭ foje vidas mension pri la lasta.]

[...kaj de Ralph Dumain.]

Gratulon pro intereskapta ELNA Newsletter #2, 1989! Mi tute subtenas la tezon de Todd Moody ("Hard Questions"). Multe amuzas min via "Editorial" (p. 2) pri la praga skolo/Diego/Rumler. Viaj lertaj ŝercoj koncize kaptas la aferon. Ĉu vi legis mian artikolon "Braĝa skoldo por praga skolo" en *Literatura Foiro* #115?

Ralph Dumain

[En la menciita artikolo, ELNA-ano Dumain forte kritikis la tezojn de la t.n. "praga artiliteratura skolo" el lingvistika starpunkto.]



RECENZE

Dorval, Deck & Christian Declerck: Nigra Magio. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1988. 215 paĝoj. Ĉe ELNA: Prezo \$13,95, kodo NIG001.

Antaŭ kelkaj jaroj la unuan fojon aperis antaŭ miaj okuloj la unua aventuro de Ksavero Kant, esperantisto kaj inspektoro en la antverpena polico: *Jaĥto veturas for... kaj veturigas la morton*. Antaŭnelonge aperis lia dua aventuro, *Kazinski venas tro malfrue*. Ĝus aperis tria, tamen kronologie unua, aventuro de pli juna Kant, simpla detektivo-enketisto, kiu ĉifoje laboras en la ombro de sia (tamen malaltstatura) superulo, enketjuĝisto Izidoro Sol, kiu ŝajne povas ne devii de la ĝusta vojo dum povra juna Kant baraktas en marĉo da kontraŭdiroj kaj nekomprenblaĵoj.

Okazis murdo en "La Picearo", malnova domo de la familio Kramers, tuta mikspoto da ekcentrikuloj kaj duon-frenezuloj. Sol kaj Kant devas eltrovi la murdinton antaŭ ol tiu ankoraŭfoje murdas. Ekstra problemo por Kant estas tio, ke li ĝus renkontis tre belan, afablan junulinon, kun kiu li enamiĝis, kaj kiu ŝajne havas ian eksterordinaran intereson kaj

scion pri la okazaĵoj de la kazo.

En *Kazinski*, tre ĝenis amaso de miselpensitaj neologismoj. Malgraŭ la sinlaŭdo sur la dorsa kovrilo, ankaŭ *Nigra magio* enhavas tiajn neologismojn, sed almenaŭ ne tiel diluve (kvankam troviĝas ankaŭ ĉi tie tiu abomeninda *men*). Por ne paroli pri neologismoj, la vortprovizo de "Dorval"/Declerck estas sufiĉe vasta, kaj mi ankaŭ povas rekomendi, ke la nesperta leganto havu kun si bonan vortaron. La stilo estas bona, flua, vigla kaj viveca, kaj la pli sperta leganto ne volos demeti la libron antaŭ ol fini ĝin.

Esperanto rolas nur unu fojon en la romano, cetere ne tro grave (pere de la lingvo Kant trovis solvon de iu flanka problemo, sed ne de la murdo mem).

Ĉi tiu verko estas parto de la nova "Stafeto"-serio de FLE. Antaŭ 30 jaroj la nomo "Stafeto" promesis gravan literaturon. La hodiaŭaj stafetaĵoj ja neniel estas gravaj, sed almenaŭ la verkoj de "Dorval" meritas legadon pro siaj popularo kaj facileco. Mi nun atendas la kvaran kaj finan romanon en la serio, *La murdo de Hurd Hadda*.

Don Harlow

LINGVO INTERNACIA: INFORMADO, TURISMO KAJ AMIKECO

De longa tempo mi ne konsideras la Internacian Lingvon Esperanto (ILEo) kiel artefaritan aŭ planitan lingvon; ĝi estas esence latino-greka lingvo kiu evoluas, en kadro de facila gramatiko, tiel kiel ĉiu skribata kaj parolata lingvo.

Pro tiuj kaŭzoj ILEo estas mia dua lingvo; mi uzas ĝin tute nature kiam mi vojaĝas fremdlanden.

Ĝis nun, aktiva kuracisto en Francio, mi interesiĝas je problemoj de maljunaj personoj ĉu bonfartaj ĉu malsanaj. Mi deziris scii, kiajn solvojn oni proponas je tiuj problemoj en Usono. Samtempe mi avidis turismi denove tra tiu lando, al kiu mi iris la unuan fojon en 1969 kaj kiun mi aprezas. La nura maniero por tion fari estis flugi al Usono, travojaĝi kaj enketi.

Mi elektis kvar urbojn:

San Diego (CA) ĉar mi aŭdis pri ĝia beleco, ĝia klimato... ĉar tie mi loĝos ĉe bonegaj malnovaj amikoj.

Sun City apud Phoenix (AZ) ĉar mi

legis pri ĝia vetero tre ŝatata de emerituloj... ĉar tie kunvivas nur personoj pli ol kvindekjaraĝaj. Tio surprizas francan kuraciston ĉar nia filozofio pri bonfartaj maljunuloj plivole emas miksigi ilin kun junuloj.

Chicago (IL) ĉar ĝia nomo impresas per sia famo... eĉ gangstera! Ĉar mi deziris vidi la Michigan-lagon.

Washington (DC) pro kaŭzoj tute evidentaj.

Mi decidis restadi naŭ tagojn en ĉiu urbo.

Tre bone! Sed kiel plani tiel longan, kompleksan, eble multekostan vojaĝon? Kiel kontaktigi hotelojn por loĝi, kolegojn por viziti, hospitalojn por diskuti pri diversaj temoj rilate al maljuniĝo, direktorojn de medicinaj domoj, ktp?

Tute nature per esperantistoj! Mi do kontaktis miajn amikojn kaj ankaŭ esper-

Silfer, G.: Desislava ridetas. La Chaux-de-Fonds/Milano: Kooperativo de Literatura Foiro, 1987. 77 paĝoj. Ĉe ELNA: Prezo \$12,00, kodo DES001.

Desislava ridetas impresas antaŭ ĉio per sia vario. Ĉi-volume kolektiĝas mallongaj verkoj—fiksformaj poemoj, blankaj versoj, poezi-cikloj, mallongaj prozpecoj—kiujn kreis Giorgio Silfer inter 1978 kaj 1985.

La tutan kolekton spicas tema kontrasto. Kun la oftaj ampoemoj, plejparte por nova edzino, kontrastas poemoj pri la mortoj de patro kaj de filo. La artefarita vivo de moderna urbeg-loĝanto kontrastas kun tiu de la rit-obsedita prahomo, vivanta en direkta kontakto kun la sezonoj. La serioza tono de la poeziaĵoj kontrastas kun la sprito de la prozaĵoj (ekz., "La paroj stultaj").

Kontrasto kaj vario tamen ne supozigu senkoheron. La diversaj eroj de la poezia mondo de Silfer interligiĝas plurmaniere. Kelkaj privilegiaj estaĵoj, ekz., la papavo kaj la paradizeo, reprezentas la esperon, ke la naturo ankoraŭ kapablos ektuŝi iun vivigan esencon ĉe la moderna homo. En la prozaj pecoj, ekz. "Serĉu loĝejon en grandurbo" kaj "La paroj stultaj", la poeto rimarkigas kun malica satiremo la materiajn kaj psikajn barojn, kiujn la ĉiutaga vivo levas inter la homoj kaj la feliĉo. Sed ĉu la ampoemoj ne situas en ĉi-sama mondo? Ili ja elvokas tiujn maloftajn momentojn kiam belo kaj amo triumfas.

La poemoj estas seriozaj, kelkaj eĉ grizaj. Sed la kolekto entute lasas optimisman impreson. Eĉ la forma kontrasto inter poezio kaj prozo ne povas vidiĝi kiel absoluta: pluraj prozaĵoj, ekz. "Kvin papavoj", estas fakte proz-poemoj.

Kun vasta kulturo, la poeto talentas aparte en trafaj metaforoj kaj en jen subtilaj, jen riĉaj harmonioj de vortmuziko. Li tre—sed ne tro—ŝatas maloftajn vortojn.

La grafikaĵoj estas allogaj, kaj la komentariaj notoj, supozeble de la aŭtoro mem, pliigas la plezuron de la leganto. Preskaŭ ĉiu poemo invitas al relegado. Bedaŭrinde, ke la bindaĵo tion ne longe toleros.

James F. Cool

Continued on Page 8

Lingvo Internacia from Page 7

antistajn kolegojn kaj delegitojn de UEA. La respondoj alvenis. Ne nur responde al miaj demandoj ... sed afable, amike, kore, invitante! Tiuj oferoj, tiuj senesceptaj helpopropozoj substrekas la sincerajn, rektajn, helpemajn trajtojn de la usona karaktero. Dank' al ĉiuj miaj korespondantoj mi povos efektiviĝi kion mi projektis. Ili ĉiuj estu kore dankataj!

Mi kolektis grandan kvanton de diversaj dokumentoj ... sed bedaŭrinde mi sendis ilin hejmen perpoŝte ... kaj ili ĝis nun ne alvenis. Mi timas, ke ili vagadas tra Suda Ameriko. Ne estas ŝerco ... ĉar leteroj kiujn mi sendis hejmen aviadile ... alvenis post du monatoj! Intertempe ili promenadis tra nordaj ŝtatoj de Usono, eĉ ĝis Bolivio! Tio ĝojigis min ĉar mi ne sciis, ke ekzistas tiom da francaj teritorioj sur la amerika kontinento! Do mi kontentiĝas per kio mi enkapigis!

Sufiĉas epilogi pri tiu aspekto de mia vojaĝo ... nun mi skribos iomete pri la kluboj aŭ rondoj, kiuj varme min akceptis. Fakte mi min sentis hejme ĉie kaj komforta kun ĉiuj. Malgraŭ la diferencoj inter Usono kaj Francio mi neniam havis iun ajn impreson de strangeco.

La Klubo de San Diego estas sufiĉe nombra, vigla, de bona strukturo kaj de interesa nivelo. Mi havis la privilegion ĉeesti kunvenojn kie parolis bonaj oratoroj kies intereso por la ILEo evidentiĝas. Ĉirkaŭ tiu kerno ekzistas vivantaj kursoj kaj amikaj rondoj kies etoson mi ĝuis.

En Sun City kuŝas nur grupeto, tre amema, kun kiu mi vivis la plej grandan parton de la tago. Plie mi havis la bonŝancon esti invitata al Tempe dum seminario kiu arigis tridek-du personojn; la spirito

de la kunvenoj plaĉis al mi kaj la sinteno estis bona. Mi notis, ke oni malmulte krokodilas.

La grupoj en Chicago kaj Washington ŝajnas malpli densaj kaj malpli multaj; tamen mi kuniĝis en sinsekvaj rondetoj ĉu hejme ĉe unu partoprenanto, ĉu en klubeto (Chicago), ĉu en muzeo, ĉu en restoracio. Ĉiuj renkontoj estis frandaj, riĉaj, kelkfoje pitoreskaj!

En la kvar urboj mi sentis, ke la ILEo vivdaŭras glate kaj kontentige.

Domaĝe ke tiom malmulte da personoj konscias pri tio tra la mondo ... kaj mi ĉiam konsterniĝas, kiam mi vidas grupeton de eksterlandanoj perditaj inter ili ... kiel sur flosanta insulo, izolita ... dum eĉ meza kono de ILEo permesus al ili ĝui el kelkaj varmoradioj de indiĝena amikeco.

D-ro Marcel Duplan, Francio

EL LA LINGVA PUTO

[Oni plurfoje petis ian rubrikon pri la lingvo Esperanto. Jen, do, la komenco. Supozeble la redaktoro skribos la pliparton de la artikoloj, sed li certe bonvenigos gastverkojn de aliaj esperantistoj.]

Vortparoj ofte konfuzaj por anglalingvanoj: manki/malhavi, lernilekscii

Tro ofte la anglalingva esperantisto konfuziĝas pro la fakto, ke du apartaj vortoj en Esperanto havas nur unuvortan respondanton en la angla lingvo. Du bonaj ekzemploj de tio estas la paroj *manki/malhavi* (to lack) kaj *lernilekscii* (to learn). Jen la metodo diferencigi inter ili.

- 1) *Manki* efektive signifas "to be lacking". Do oni ne diru (*) "Mi mankas tion", ĉar tio estas rekta eraro; la ĝusta formulo por "I lack that" estas "tio mankas al mi" ("that is lacking to me"). Se oni volas tamen reteni la aktivan sencon, oni diru "mi malhavas tion".
- 2) Usonanoj ofte uzas *lerni* kiam ili volas diri *ekscii*; ambaŭ respondas al la usonangla "to learn". Sed *lerni* rilatas al daŭra procedo, kaj *ekscii* al subita statŝanĝo. Ekzemple, neniam diru (*) "mi lernis, ke mia filo estis arestita", ĉar tio rilatas al subita statŝanĝo de nescio al scio; do la ĝusta esprimo estas "mi ekscii, ke mia filo estis arestita". Aliflanke, ĉar temas pri daŭra procedo, oni ja rajtas diri: "mi lernis dum la pasoj

de la jaroj, ke tiu persono estas fida".

Similajn erarojn oni ofte trovas ĉe la nretransitivaj/transitivaj vortparoj *bruli/bruligi*, *droni/dronigi*, ktp., por kiuj ekzistas nur unu responda anglalingva vorto.

Don Harlow

ALIVORTE: Kartludante

[Antaŭ kelkaj jaroj, la tiama redaktoro Charles R. L. Power iniciatis rubrikon en la *Novajletero*, "Riĉigu vian vorttrezoron", kiu plaĉis al multaj legantoj. Nun ni provizore aperigas similan rubrikon, verkitan de la anonima "Boĥo". Ĉu ĝi plaĉas al vi?]

Ĉu vi povas rilati la vortojn en la unua listo kun tiuj en la dua?

- | | |
|------------|---------------------|
| 1. aso | a. meld |
| 2. atuto | b. trump |
| 3. bubo | c. queen |
| 4. damo | ĉ. king |
| 5. demeto | d. hearts |
| 6. emblemo | e. suit |
| 7. karoo | f. ace |
| 8. kero | g. pack (remaining) |
| 9. piko | ĝ. joker |
| 10. preno | h. spades |
| 11. reĝo | ĥ. clubs |
| 12. talono | i. diamonds |
| 13. trefo | j. trick |

Solve en numero 1989(5).

LITERATURA KAMERO

[Sendu viajn literaturajojn al la Redaktoro ĉe la redaktora adreso: P.O. Box 551, Pinole, CA 94564.]

OKAZAĴO ĈE LA OFICIROJ de Evaristo Garcia

Kiam mi estis en la aerarmeo dum la dua mondmilito, mi estis postenita al la aerbazo ĉe Bangor, Maine.

Estis malvarme tie dum la vintro, kaj estis multe da glacio sur la stratoj. Ankaŭ estis montetaj lokoj en la stratoj. Aŭtomobilo kun kvar oficiroj ne povis supreniri malgrandan monteton pro la glacio sur la strato. La oficiroj eliris el la aŭto kaj puŝis ĝin. Kiam ili preskaŭ atingis la supron de la malgranda monteto, soldatoj venis por helpi ilin. La soldatoj alproksimiĝis kaj salutis la oficirojn. La oficiroj redonis la saluton, sed kiam ili faris tion, la aŭtomobilo glitis malsupren al la malsupro de la malgranda monteto.

[Evaristo Garcia discovered Esperanto in an advertisement when he was in college but found no way to continue with it until a study group was organized in 1984 in Harlingen, TX. Although past his 80th year, he enrolled in a beginning class and has become one of the best students. For many years he has been a Spanish-English translator for his local church.]

FINA SOLVO DE LA USONA PROBLEMO?

[En antaŭa numero s-ro Jerry Veit de-
mandis pri la deveno de la vorto
"Usono". Tiu demando jam dum jaroj
ĝenis la esperantistojn. Pri ĝi verkis
konjektajn artikolojn i.a. Bernard
Golden kaj nia antaŭa prezidanto Tom
Goldman.]

[Intertempe, ordigante malnovajn Espe-
ranto-revuojn en la C.O., Mark Stephens
hazarde trovis la jenan leteron. Ĝi estas
verkita de Gaston Moch, konata franca
esperantisto, eks-armeano kaj pacifisto,
siatempe ano de la Delegitaro por Al-
preno de Internacia Lingvo, poste idisto.
Ĝi aperis en la revuo "The American
Esperanto Journal", numero de Marto,
1908.]

AL THE AMERICAN ESPERANTO
JOURNAL:

Estimata Samideano:

Eble al mi apartenas la honoro, esti la
esperantista baptopatro de via lando. En
mia libreto *Historia resumo de l' Arbitra-
cio* konstanta, verkita dum la somero de
1904, kaj eldonita en januaro 1905, mi
faris efektive la jenan proponon, represen-
tan poste sub la rubriko *Vortaro Paci-
fisma* en la unua numero de *Esperanto
Pacifista* (julio 1905):

"Amerikana, kiu koncernas speciale
Unuigitajn Ŝtatojn, aŭ ilian loĝantaron—
Amerikano, regnanto de Unuigitaj Ŝta-
toj.—Vidu: Usono.

"Usono, Unuigitaj Ŝtatoj de Norda
Ameriko.—Strange estas, ke ekzistas
neniu nomo por la regnantoj de Unuigitaj
Ŝtatoj kaj por ilia nacio. Oni nomas ilin,
ĝenerale, Amerikanoj; sed tiu nomo estas
evidente malpreciza.

"De kelkaj jaroj, oni komencas, en
Unuigitaj Ŝtatoj, nomi la landon per la
nomo *Usona*, kunmetita per la ĉefliteroj
de la vortoj *United States of North Amer-
ica* (Unuigitaj Ŝtatoj de Norda Ameriko);
tio, kio koncernas la landon, estas
usonian, kaj, simile, la regnanto estas
nomata *Usonian*. (Same, la konata
moknomo *Uncle Sam* (Onklo Sam) de-
venis de la oficiala mallongigo *U. S.
Am.*).¹ Tiuj nomoj, tre oportunaj kaj bon-
sonaj, ŝajnas esti disvastiĝontaj kaj ofi-
ciale akceptotaj.

"En Esperanto, mi proponas nomi la
landon *Usono*; la responda adjektivo
estus *Usona*, kaj la regnanto *Usonano*.

"Eble oni povus diri *Usonujo* aŭ
Usonlando por la regno, kaj *Usono* por la
regnanto. Sed la ĉi superaj vortoj ŝajnas al

mi preferindaj."

Principe, mi uzas en *Espero Pacifista*
novajn vortojn, nur en okazo, se, el
teknika vidpunkto, ili estas necesaj, por
esprimi ideon, por kiu mankis ĝis nun
speciala esprimo. Pri Usono, kiel ajn
necesa ŝajnis al mi la enkonduko de vorto
signifanta "regnanto de Unuigitaj Ŝtatoj,"
oni povis atendi almenaŭ ĝis kiam la
koncernataj esperantistoj, t.e., niaj
amikoj el tiu lando, estos konigintaj sian
opinion. Mi ne uzis do tiun nomon, kaj
daŭris, provizore, diri "Unuigitaj Ŝtatoj"
kaj "Amerikano." Sed, en la septembra
numero, mi faris eksperimenton: ĉar la
vorto Usono troviĝis en la titolo de mal-
longa noto tradukita de unu el niaj kun-
laborantoj, mi lasis ĝin, por ekscii kiun
efekton ĝi faros, ĉar oni devis ĝin rimarki,
por tio, ke ĝi estis presita per dikaj literoj.

La sola efekto estis malaproba letero
de s-ro Twombly,² kiu, versimile, ne estis
leginta mian unuan noton, kaj rimarkigis
al mi (kion mi sciis), ke la nomo Usona,
ĝis nun, estas uzata malofte kaj precipe
kiel ŝerco. Pri tio mi respondis per la jena
vortara noto en la decembra numero de la
sama jaro 1905:

"Usono.—La uzo de tiu vorto, en nia
septembra numero, estis tre kritikata en
letero de s-ro Twombly. Ni scias ke oni
povas fari kontraŭ ĝi tiun kontraŭpa-
rolon, ke ĝi ne estas oficiale, eĉ nek
ĝenerale uzata en Unuigitaj Ŝtatoj mem.
Tial, en la unua parto de tiu vortaro, mi
proponis ĝin nur por la estonto, konser-
vante, por la estonto, la vorton Ameri-
kano, por montri la regnantojn kaj
loĝantojn de Unuigitaj Ŝtatoj; kaj la vorto
Usono estis uzata nur unufoje en la revuo,
de kunlaboranto, kies tekston oni ne
ŝanĝis. Amerikano havas la duoblan
malutilon, ke oni ne komprenas ĉiam la
diferencon inter ĝi kaj la Amerika, kaj ke
ĝi donas neniun nomon por la regno
mem. Kelkaj personoj, mi scias, diras
Unuiĝo kaj Unuiĝanoj, kiu, ankaŭ, ne
estas tre bona. Stranga situacio, tiu de
lando kaj popolo sen nomo!"

Sed nun, kiam la vorto Usono estas
uzata de d-ro Zamenhof, mi opinias ke la
estonto, kiun mi aludis en la ĉi supra noto,
estas alveninta; kaj mi konsideras do
Usono kaj Usonano kiel enkondukitaj
por anstataŭi la maloportunan Unuigitaj
Ŝtatoj kaj la neprecizan Amerikano.

Mi devas aldoni ke mi scias, ke s-ro
Sam. Meyer, el La Rochelle, faris la
saman proponon, sed mi tute ne memo-

ras, je kiu epoko. Versimile, li respondos
ankaŭ al via demando. Sed, kiu ajn el ni
estas kronologie la unua, ĉiu, prezentante
sian proponon, ne konis la ideon de l' alia.
Ni povas do ambaŭ pretendi la titolon de
elpensinto: cetere, du baptopatroj ne es-
tas troaj por tiel granda kaj grava lando!

Pri via demando, ĉu oni devas diri
Usono aŭ *Usonujo*, mi esprimis mian
preferon en la unua suprecitata noto. Mia
motivo ne estas nur la kompara mallon-
geco de *Usono*, sed ankaŭ la esenco de la
sufikso *uj*. La nomo *Usonujo* signifus, ke
via lando estas loĝata de etnike aparta
gento, aŭ de popolo parolanta apartan
lingvon, propran al ĝi, kaj ke la lando
ricevis la nomon de la dirita gento aŭ
lingvo. Tia ne estas la okazo, ĉar la
Usonanoj estas ja unu el la plej miksitaj
popoloj en la mondo, kaj parolas plimulte
kaj oficiale la lingvon de la angloj. Al mi
ŝajnas do ke oni devas diri Anglo, An-
glujo, Franco, Francujo, kaj Portugaljo,
Portugalujo, sed Usono, Usonano, same
kiel Brazilo, Brazilano.

Ekzistas laŭvere en Eŭropo du landoj,
Belgujo kaj Svisujo, kies nomoj ne re-
spondas al la ĉi supraj difinoj. Sed vi
scias, kiel fortaj estas la naciaj kontrastoj
kaj kontraŭstaroj en nia malfeliĉa
Eŭropo. Ambaŭ popoloj, la Belga kaj la
Svisa, havas, de multaj centjaroj, tiel
apartan karakteron kaj historian indi-
viduecon, ke, kvankam tute malhomoge-
naj, ili formas kvazaŭ unuecajn gentojn; kaj
la nomo Belgoj estis cetere tiu de antikva
gento, kaj Belgujo tiu de Norda Gallujo.

Resume, oni devas diri, laŭ mi, *Usono*
kaj *Kanado* por la du nordaj landoj de
Nordameriko; por la suda, kies nomo
venas de ĝia ĉefurbo, mi konsilas diri
Meksiklando.

Kredu min, estimata sinjoro, sincere
via,

GASTON MOCH
Redaktoro de *Espero Pacifista*
Neuilly-sur-Seine, Francujo.

¹ La deveno de "Uncle Sam" estas aparta
afero. La entreprenisto, dum nia milito kontraŭ
Anglujo, nomiĝis Elbert Anderson: li provizis
nutraĵojn al la militistaro. Liaj skatoloj estis
stampitaj "E. A.—U. S." La nomo de l' in-
spektoro de l' nutraĵoj estis Samuel Wilson,
kiun militistoj ame nomis "Uncle Sam." Unu
ŝercema militisto klarigis ke la literoj U. S.
rilatis ne al Unuigitaj Ŝtatoj sed al "Uncle
Sam," la inspektoro, kaj la ŝercaĵo restis.

² Nia amiko estis nun kun ni. S-ro Twombly
aprobas Usono. Vidu lian amikan leteron en la
februara numero.—Red. A. E. J.

Announcements

[La rubriko Anoncoj enhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondecigi definitivan plenumon de io ajn promesita en anonco.]

Derek Roff, redaktoro de la bulteno de la Intermontara Grupo, ellaboris **novan sistemon por esperantigi WordPerfect 5.0 por MS-DOS komputiloj**. Kiu volas ricevi la tiuteman dokumenton, bonvolu sendi koverton kun poŝtmarko al la **adreso de la Centra Oficejo de ELNA**, kun klara indiko, pri kio temas.

S-ro James Davis informas nin, ke la **bildprospekto pri la parko Sansouci en Potsdam** (Germana DR), estas nun havebla de UEA kontraŭ 6,50 guldenoj plus poŝtkosto.

Ĝus aperis la **ĉi-jara eldono de l' Amikeca Reto**, kun 184 vojaĝpunktojn en 29 landoj. Tra la 80 paĝoj de la adresaro, oni malkovras multajn nekutimajn eblecojn por klare viziti mondparton. Oni sin turnu al: **Amikeca Reto, Republique 63, Charge—F—AMBOISE, Francio**, sendante 30 francajn frankojn por la katalogo kun afranko. Por aliĝi al la reto, petu aniĝilon ĉe la sama adreso.

De la 15a ĝis la 26a de aŭgusto en Pollando okazos la **junulara naturista tendaro**, ĉe la Balta Maro en urbo MIEDZYDROJE. Oni loĝos en kampadejaj dometoj (po 3 personoj en ĉiu dometo). Plena kosto por tranokto, tri manĝoj tage, ekskursoj kaj programoj, estos 130-150 dolaroj. Informoj: **Grzegorz WIENC, 62-005 OW-INSKA, ul. Poprzeczna 14c/13, Pollando**.

Jen la somera horaro por la **Esperantaj dissendoj de Vatikana Radio**. Ĵaŭde, 05.00 UTC: FM-103.8 MHz, AM-1611 kHz, kurtondoj 49m (6248 kHz), 41m (7250 kHz), 31m (9755 kHz), 25m (11715 kHz). Dimanĉe, 19.00 UTC: FM-93.3-96.3-105 MHz, AM-526-1530 kHz, kurtondoj 49m (6190, 6248 kHz), 41m (7250 kHz), 31m (9645 kHz).

Dimanĉe, 20.00 UTC: AM-1530 kHz, kurtondoj 31m (9625 kHz), 25m (11700 kHz), 19m (15120 kHz). La faldfolio "Radio Vaticana Programmes" estas havebla de **Ufficio Propaganda e Sviluppo, 00120 CITTA DEL VATICANO**. Skribu Esperante.

Junulara Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio anoncas okaze de 150-jariĝo de fotokesto kaj honore al Monda junulara kaj studenta festivalo 1989 **fotokonkurso "Juneco 89"**. Limdato por akcepto de fotoj estas 1989.09.15. Ekzempleron de la reguloj oni povas ricevi ĉe **JUDr. Petr ŠMID, Kostelecke 1829, 547 01 NACHOD, Ĉeĥoslovakio**.

If you have a computer and a modem, you can have access to a **bulletin board service (BBS)** that caters to foreign languages including Esperanto. **The Tower of Babble, 300/1200 baud, (817) 281-0612, Sysop: Darin Arrick**.

La nova **Esperanto-Video-Muzika Centro** en Sovetio baldaŭ eldonos diskon de komponisto, poeto, reĝisoro Vladimir SOROKA, kaj ankaŭ la unuan muzikan video-filmon pri la 2a Internacia Junulara Esperanto-Renkontiĝo okazinta en Minsk. Por informoj: **Fondaĵo de Esperantistaj Junularaj Aranĝoj, SU-109004 MOSKVA, abonkesto 78, Sovetio**.

"**Daŭra mendo**" estas nova metodo, per kiu oni povas ricevi librojn de Edistudio tuj post la eldoniĝo, pagante al la kompanio pere de UEA-konto aŭ persona bankĉeko post ricevo de la verko. (Edistudio estas eldoninto de i.a. la *Itala Antologio*, la *Aŭstralia Antologio*, kaj la kompleta poemaro de William Auld, *En Barko Sempilota*.) Por informoj: **Edistudio, c.p. 213, I-56100 PISA, Italio**.

Ekde ĉi tiu jaro, aperas nova **E-periodaĵo eldonata de junuloj**. Ĝi estas la voĉo de junaj esperantistoj en Tanzanio, kaj nomiĝas *Orienta Stelo*. Interesitoj povas akiri ĝin kontraŭ unu Internacia Respond-Kupono de: **Anita DAG-MARSDOTTLER, Mariehamsgatan 18, S-16479 KISTA, Svedio**. Gratulojn,

bondezirojn kaj kontribuojn sendu al: **Tabora Esperanto-Federacio, SLP 1727, TABORA, Tanzanio**.

Pola samideanino (vidu foton) kun naŭmonata filo, instruistino pri biologio, **serĉas laborpostenon en Usono**. Ŝi povas okupiĝi pri hejma laboro, flegi, ŝatas infanojn, estas laborema kaj respondeca, interesiĝas pri literaturo, folkloro, astrologio, psikoanalizo, lernas



Esperanton kaj la anglan. Eventualaj intereso kontaktu: **Wanda TARKOWSKA, 05-400 OTWOCK, ul. Pomiatowskiego 3/71, Pollando**.

GETHER Istvan, hungara ekonomikisto, flua esperantisto, ankaŭ flue parolas la anglan lingvon, fine de septembro kaj dum oktobro vizitos Usonon, ankaŭ la okcidentan parton. Li jam prelegis en pluraj landoj pri la hungara ekonomio, kaj eventuale povos fari tion ankaŭ en usonaj universitatoj. Kiuj pretas gastigi lin kaj eble uzi lin por publikaj rilatoj, kontaktu Thomas **GOLDMAN, 7008 Millwood Rd., BETHESDA MD 20817, tel. (301) 229-4214**.





VOLAS KORESPONDI

Amikeco trans limoj

Noto: Nomojn kaj adresojn ni prezentas dikliteraj; familiaj kaj urbaj nomoj estas MAJUSKLAJ. Komojn ni uzas por montri ŝanĝon de unu linio al alia en adreso.

BULGARIO

Keti PRODANOVA, str. "Zahari Kruŝa" 26, 1606 SOFLA. 32-jara son-regisorino en Bulgara Televid-centro, edzino kun du infanoj, interesiĝas pri arto, muziko, floroj, vojaĝoj.

ĈEĤOSLOVAKIO

Ivana DLASKOVA, Kojeticka 4, 40003 USTI N. LABEM. 16-jara studentino, ŝatas legi kaj kudri, interesiĝas pri historio kaj etnografio, volas interŝanĝi suvenirojn, bk, gramofondiskojn.

Marcela SLAJSOVA, Wolkerova 1111, CS-565 01 CHOEN. 24-jara virino interesiĝas pri historio, geografio, muziko, filmoj kaj teatro.

Lenka KLIMOVA, Drazkovice 33, 533 33. 25-jara estonta instruistino, studas biologion, interesiĝas pri sporto, naturo, elektroniko, personaj komputiloj.

Georg JANES, Prochenska 884, 341 01 HORIZDOVICE. 27-jara viro.

Inĝ. Karel BARTOS, Zahradni 15, 787 01 SUMPERK. 30-jara konstru-inĝeniero, biciklisto, kun usonano pri ĉiuj flankoj de la sporto biciklada.

Vaclav STIBOR, K elektrarne 498, 277 13 KOSTELECN. LAB. 34-jara edzo kun du filinetoj, apud Prago, interesiĝas pri historiaj konstruaĵoj, kulturo, kutimoj, naturo, kolektas bk kaj bele afrankitajn kovertojn.

JELSIK Marcel, 373 41 HLUBOKA NAD VLTAVOU 761. Grupanoj.

HUNGARIO

Barnabas RIGO, Munkacsy u. 10., 5100 JASZBERENY. 14-jara lemento kun bonaj notoj, kun lemant(in)o, kolektas pm.

GRAF Gabor, H-8060 MOR, Sztahanov u.10. 28-jara kemiteknikisto, okupiĝas profesie pri defendo de naturo kaj medio, eksterprofesie pri mieloproduktado; sportisto pri ŝotokan-karateo, interesiĝas pri vivmanieroj de popoloj.

IRANO

Mojgan GONĈE-ARGAVAN, Narmak—Khavar Ave.—opposite the university, "Elm va sanat"—Mehran Lane pl. 21, TEHRAN 16838. 17-jara komencantino, volas korespondi por helpi lerni la Esperantan lingvon.

Hamid Small ZADEH, Meydane Sattar Khan, Kuyesahid Farjamrad, TABRIZ 51876, NV 64. Lemanto, kun esperantistoj en aliaj landoj.

POLLANDO

Agnieszka SZYMONIAK, 63-450 SOBOTKA 86/7, woj. Koliskie. Lernantino de la sesa klaso, interesiĝas pri matematiko, filmoj kaj sporto, legas librojn.

ROSZAK Karolina, Zychlin 13/4, 63-324 KUCZKOW. Lernantino de la sesa klaso, interesiĝas pri plastiko, kolektas ludilojn, pupojn, ursetojn, volus pli bone koni batalojn de Malproksima Oriento.

Anita KRYSZTOFIAK, Zychlin 6, 63-324 KUCZKOW. 12-jara lernantino, interesiĝas pri Esperanto, humuro kaj poŝtmarkoj, ŝatas legi librojn.

TOMASZEWSKA Paulina, Sobotka 23, 63-450 SOBOTKA, woj. Koliskie. 13-jara lernantino, interesiĝas pri sporto, legas librojn, kolektas pm.

Justyna GRACZ, Nieborza 36, PL-64-212 SIEDLEC. 16-jara lernantino de gimnazio, interesiĝas pri biologio, turismo, kaj precipe pri Esperanto, kolektas bk kaj pupojn.

Wojciech ZAWALICH, ul. 1-go Maja 44/1, 19-335 PROSTKI, woj. Suwelskie. 17-jara komencanto.

Dorote DOLECKE, strato: de Rejton 6/5, 37-700 PRZEMYSL. 20-jara knabino, interesiĝas pri turismo kaj pri lingvoj (precipe Esperanto).

Ireneusz FIEDOROWICZ, Zeromskiego 40, 19-500 GOLDAP. 23-jara studento de medicino, interesiĝas pri birdoj, ĝardenkulturado, medicino, Ĉinio, pri ĉiuj temoj kaj kolekti esperantaĵojn.

Krzysztof DOBERSZTYN, 62-110 DAMASLAWEK, Grunwaldzka 15. 26-jara studento en Agrokultura Akademio, interesiĝas pri sporto, muziko, filmoj, naturo, ĉevaloj, usona kulturo, kolektas bk kaj monerojn.

Leszek T. KLUZA, 88-140 GNIEWKOWO, ul. Torunska 17a. 26-jara fraŭlo, poŝtisto, intereigiĝas pri sportoj, kolektas bildkartojn, flagetojn.

SKIBA Jan, ul. Florianska 16/22, 44-217 RYBNIK. 35-jara viro, interesiĝas pri geografio, turismo kaj vojaĝoj, kolektas bk, pm, monojn.

Rikardo PIOTROWSKI, ul. Zwakowska 12/3, 43-100 TYCHY. 63-jara emeritulo, kolektas poŝtmarkojn.

SOVETIO

SIDOROV Anatolo, Komi ASSR, SU-167031 SIKTIVKAR, Str. Jeleznodorjna 53/6. 26-jara laboristo, interesiĝas pri la arĥeologio, historio, etnografio, kulturo de amerikaj indianoj.

Local Contacts

[* = Issues a regular or occasional bulletin or newsletter]

Arizona: Wm. Shanks, E-o Soc. of AZ, 1345 W.

Escarpa, Mesa, AZ 85201

California: E-o Assn. of Los Angeles, 1112-7th St.

#811, Santa Monica, CA 90403

*California: E-o Klubo de San Diego, Box 288012, San Diego, CA 92128, (619) 284-8081

California: Inland Empire E-o Group, 22797 Barton Rd.

#117, Grand Terrace, CA 92324, (714) 689-5576 or

(619) 949-1958

California: Orange Co. E-o Assn., Box 1538, Garden

Grove, CA 92642

*California: E-o Soc. of Ventura County, 5968 Joshua

Trail, Camarillo, CA 93010

California: Santa Barbara E-o Soc., 4710 Dexter Dr. #9,

Santa Barbara, CA 93110

*California: SFERO, 410 Darrell Rd., Hillsborough, CA

94010, (415) 342-1796

*California: Berkeley E-o League, Box 324, Berkeley,

CA 94701-0324, (415) 222-0187

*California: E-o Group, 440 Bret Harte Rd.,

Sacramento, CA 95864

Colorado: E-o Assn., 4825 W. Moorhead Cir., Boulder,

CO 80303

Colorado: Denver E-o Group, 995 Humbolt #205,

Denver, CO 80218

*District of Columbia: Washington E-o Soc., 4406 -

35th St. NW, Washington, DC 20008, (202) 363-

6197

Florida: Florida E-o Soc., 3988 Sabal Drive, Oviedo, FL

32765

Idaho: David Baron, Box 37, Eagle, ID 83616

*Illinois: Chicago E-o Soc., Box 64774, Chicago, IL

60664-0774

Maryland: T. Goodman, 3218 Shelburne Rd.,

Baltimore, MD 21208

*Michigan: E-o Soc. of Michigan, PO Box 3011,

Southfield, MI 48037, (313) 646-2965

Michigan: Soc. of E-o Language Friends, P.O. Box

1178, Flint, MI 48503, (313) 233-4446

Michigan: Cereal City Esperanto Friends, P.O. Box 41,

Battle Creek, MI 49016-0041

Missouri: St. Louis E-o Group, 8894 Berkay Ave.,

Jennings, MO 63136

Montana: Montana E-o Soc., 330 Lindley Pl., Bozeman,

MT 59715

*Nebraska: Nebraska Intermacia-lingva Asocio, R.F.D.

1 Box 29, Wilber, NE 68465, (402) 821-2027

*New York: NYC E-o Soc., 80-50 Baxter Ave. #3D,

Elmhurst, NY 11373

New York: UN Office of UEA, 777 United Nations

Plaza, New York, NY 10017

North Carolina: E-o Society of the Triangle, 5400

Belsay Drive, Raleigh, NC 27612

*Ohio: E-o Assn. of Ohio, 1144 Kingsdale Terr.,

Columbus, OH 43220

*Oregon: Portland E-o Soc., 11905 SW Settler Way,

Beaverton, OR 97005

Pennsylvania: 26 E. Roomfort Rd., Philadelphia, PA

19119, (215) 248-0493

Texas: Amin F. Doneis Sr., Box 105, Pharr, TX 78577,

(512) 787-2390

Texas: Rio Grande Valley E-istaro, Prenda Cook, Box

7167, Harlingen, TX 78550, (512) 423-3056

Utah: E-o Club, Box 2166, Salt Lake City, UT 84110

Washington: Seattle E-o Soc., 6002 NE 61st St., Seattle,

WA 98115

Wisconsin: E-o Society of Wisconsin, 1958 N. 38th St.,

Milwaukee, WI 53208

*Regional (Rocky Mountain States): Intermountain E-o

Group (AZ, CO, ID, MT, NM, UT, WY), p/a Charles

Tustin, P.O. Box 112, Coram, MT 59913

Regional (Tidewater): E-o Society of the Carolinas and

Virginia, P.O. Box 283, Durham, NC 27702-0283

*Regional (New England): E-o Soc. of New England,

P.O. Box 655, Concord, MA 01742, (508) 264-4349

Special Interest: E-o Language Toastmasters Club, P.O.


Box 60860, Sacramento, CA 95860, (916) 485-3116

Esperanto League for North America, Inc.
 P.O. Box 1129
 El Cerrito, CA, 94530
 Usono/USA

Nonprofit Organization
 U.S. POSTAGE
 PAID
 Berkeley, CA
 Permit No. 330

NEWS—PLEASE EXPEDITE

ESPERANTO



TRAVEL '89

CUBA—A PROBLEM FOR AMERICAN
 ESPERANTISTS
 (ĈU NI IRU—ĈĈ KONTRAŬLEGE?)

La 75a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Havana, Kubo 14an-21an julio, 1990. Aktuale, sen speciala permeso Usonanoj ne rajtas viziti Kubon laŭleĝe. Ekzistas usona leĝo, nomata "Komerco kun Malamikoj" ("Trading With the Enemy"), kies celo estas puni tiujn naciujn, kiuj ne agis kiel nia registaro deziras, ke ili agu. Kaj la leĝo estis verkita speciale por puni Kubon kiam ĝi "naciigis" usonajn kompaniojn post la revolucio de 1959 sen pago al la posedantoj.

Dum sia prezidenteco, Jimmy Carter nuligis la regulon kaj permesis, ke usonanoj iru laŭvole al Kubo—same kiel ni rajtas iri kaj viziti preskaŭ ĉiun nacion en la mondo. Sed kiam Reagan elektiĝis, li restarigis la regulon, provante puni Kubon per manko de usonaj turistaj dolaroj.

Aktuale usonaj civitanoj rajtas viziti Kubon nur se la vizito havas specifan laŭleĝan kialon, kaj bedaŭrinde ĉeesti UK de Esperanto ne kvalifikas. Do la malfeliĉiga fakto estas, ke preskaŭ ĉiu usona esperantisto, kiu volas iri al Kubo, povas nur kontraŭleĝe iri.

Ĉu ni fakte povas veturi al Kubo? Jes, ni povas—ni ne rajtas—sed ni povas. Ni povas iri tra aŭ Meksiko aŭ Kanado. (Pro la fakto, ke kutime oni ne flugas norden kiam oni deziras flugi suden, usonanoj kiuj vizitas Kubon kutime iras tra Meksikurbo.)

La fakto estas, ke sufiĉe multe da usonanoj iras al Kubo. Ili iras por viziti parencojn; ili iras kiel parto de studgrupo en iu fako aŭ medio; ili peras per antaŭpagita invito de la registaro; ili iras kiel ĵurnalistoj por raporti pri la nacio; aŭ ili iras simple kiel turistoj, ne anoncante la kialon. Mi lastatempe parolis kun kelkaj, kiuj eĉ ne sciis, ke ili ne rajtas iri tien laŭleĝe. Ili estis en Meksiko, legis reklamojn pri la eblecoj turisti en Kubo, aĉetis biletojn en Meksiko—kaj revenis sen iu ajn problemo.

Tamen kelkaj kiuj iris, kiel Robert Redford, nun frontas proceson kontraŭ ili, aŭ almenaŭ suferas pro ĝenado de minacata proceso. Ankaŭ, almenaŭ unu kompanio aranĝinta turistajn vizitojn al Kubo nun frontas akuzon pri krimo kaj leĝe batalas por eviti grandegan punmonon kaj 20 jarojn en la karceroj por la prezidanto. Alia kompanio, Marazul, kiu ĉefe aranĝas la laŭleĝajn vizitojn al Kubo, estis simile akuzita kaj procesita, kaj finfine venkis—sed kostis al ili \$50 000 por advokatoj!

Aliloke vi vidos oficialan anoncon, ke ELNA ne povas akcepti aŭ peri aliĝon al la Kuba UK, pro risko de perdo de la senimposta stato (kaj ankaŭ por ke ne ekzistu en la oficejo pruvo pri intenco viziti Kubon, kiun la registaro povus havigi kaj uzi kontraŭ iu). Pro la fakto, ke la Direktoro de Esperanto Vojaĝ-Servo persone riskus grandan monperdon kaj, eĉ pli grave, perdon de la libereco, ankaŭ Esperanto Vojaĝ-Servo ne povos helpi Esperantistojn kontraŭleĝe iri al Kubo. Do se vi tamen decidis iri al Kubo, nek ELNA nek EVS povos helpi vin. Mi jam havis la feliĉan okazon viziti Kubon kiel vojaĝagento, kaj mi asertas, ke Kubo estas tre vizitinda loko—kun bonaj hoteloj, bona servado, pura trinkebla akvo, belaj plaĝoj, interesaj pejzaĝoj, amika popolo, bonegaj kulturaj programoj, kaj multaj aktivaj kaj entuziasmaj Esperantistoj. La kuba registaro certe entuziasme akceptos kongresanojn kaj helpos aranĝi elstaran kongreson.

Sed, ĉu ni partoprenu eĉ kontraŭleĝe? Ĉu ni akceptu la stultan regulon de nia registaro sen plendo? Ĉu vi riskos akuzon de krimo aŭ ĝenado fare de nia registaro? Ĉiu devas finfine decidi tion por si mem.

LUCILLE C. HARMON, DIRECTOR
 ESPERANTO TRAVEL SERVICE
 578 GRAND AVENUE
 OAKLAND, CA 94610
 (415) 836-1710

Address Correction Requested
 Return Postage Guaranteed



President: Ken Thomson (1990)
 Vice President: Dr. Duncan Charters (1990)
 Secretary: Virginia Stewart (1989)
 Treasurer: John B. Massey (1991)
 Other Board Members: Dr. Ronald Glossop (1989), Frank Helmuth (1989), Charles R. L. Power (1989), Prof. James Fonseca (1990), William R. Harmon (1990), David Wolff (1990), Ellen Eddy (1991), Nels M. Nelson (1991), William H. Schmlz (1991)
 Commissioners: William R. Harmon (CO), D. Holland-Kaupp (Correspondence Courses), J. Gildemeister (Legislative Affairs), R. Kent Jones (Science & Technology), Jim Deer (Tape Service), Lucy Harmon (Travel Affairs), J. B. Massey (Wills and Gifting), Ellie Suzin (Women's Affairs), Dr. James Cool (Youth Affairs), Dr. Julius Manson (United Nations), John B. Massey, William H. Schulze and Sidney V. Steinberg (Kapitala Fondusa Komitato)
 Director, ELNA CO: Mark Stephens
 ELNA Archivist: Hal Dreyer

Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member(s) shown.

ELNA Dues for 1989	
Regular	\$25
Family	\$37.50
Youth (under 26)	\$12.50
Senior (65+)	\$15
Sustaining	\$50
Life	\$500

Dues are for the calendar year and are tax-deductible.

UEA dues 1989	
Member-Guidebook only (MG)	\$ 7.00
Member-Yearbook only (MY)	\$16.00
Member-Subscriber (MA)	\$39.00
Societo Zamenhof (additional)	\$78.00
Subscription only to Esperanto	\$23.00
Subscription only to Kontakto	\$12.00
Life Membership in UEA	\$975.00

Send payments for UEA memberships or subscriptions to ELNA/UEA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Make all checks payable to ELNA.

MOVING? DON'T LEAVE ESPERANTO BEHIND! If you have moved recently or are planning to move in the near future, don't forget to send a change-of-address card to the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito CA 94530. This will assure your continued receipt of the Newsletter and other information. If you don't have a stamp handy, give the CO a call at (415) 653-0998. Thanks!

DEADLINE FOR MATERIAL FOR ISSUE 1989(5) of the ELNA Newsletter is August 25, 1989!

DEADLINE FOR MATERIAL FOR ISSUE 1989(6) of the ELNA Newsletter is October 25, 1989!

ELNA Newsletter
 Volume 25, No. 4
 ISSN 0030-5065
 Esperanto League for North America, Inc.
 P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530
 Telephone: (415) 653-0998
 Editor: Don Harlow
 Typesetting & Graphic Design:
 Gregory V. Wasson